

ESPERANTO EN MIA VIVO

Jam de kiam mi estis bebo mi nesciante havis kontakton kun esperanto. Mia patro, kiu estis fervora esperantoparolanto, korespondis kun amiko en Germanio. Multajn jarojn poste, kiam mi estis junulino, li montris al mi etan foton de la 1930-aj jaroj pri alia patro, kiu tenis sian bebon inter siaj brakoj dirante: "Jen estas germana bebo, kiu naskiĝis samtempe kiam mia bebo naskiĝis". Lia korespondanto en Germanio geedziĝis samtempe kiam miaj gepatroj kaj samtempe al ili naskiĝis bebo. Patro rakontis pri sia bona amiko en Germanio kaj pri ties ĝojo teni la knabineton inter siaj brakoj. Tiu estis la lasta letero. Mia patro rakontis, ke post la komenco de la milito ne plu venis leteroj el Germanio. Kiam mi aŭdis tion, mi jam estis tiel aĝa, ke mi komprenis la signifon de tio.

Dum mia infanaĝo, post la fino de la milito, mia hejmo ofte akceptis esperantajn gastojn. Mi ne povis paroli kun ili kaj multaj ne restas en mia memoro. Tamen tri eventoj klare restas en la memoro. Iu ĉeĥa samideano, kiu konis pri "fontplumoj", luksaj, bonaj inkoskribiloj konstruitaj en Ĉeĥio. Li dum iuj jaroj laboris en la librovendejo de miaj gepatroj. Tie ni ankaŭ vendis la luksajn inkoskribilojn kaj diversspecajn pli malpli valorajn paperojn kaj leterpaperojn. Mi memoras, ke tiu sinjoro kaj lia edzino festis julon ĉe ni. Mi ankoraŭ klare vidas ilin ĉe la tablo. Alia memoro devenas de la jaroj, kiam okazis la "famaj esperanto-semajnoj de Frostavallen". Tiam mia patro invitis hejmen kelkajn el la partoprenantoj. Ni loĝis proksime al Frostavallen. Mi memoras geedzan paron el Nov-Zelando kaj mi komprenis, ke tio situas tre longe for. Nun mia filo loĝas en Aŭstralio. Strange, sed nun tio ne estas same longe for. La mondo fariĝis pli malgranda kaj pli bezonus esperanton.

Iun someron vizitis nin en nia somerdomo bona angla esperantisto. Li restis kelkajn semajnojn kaj parolis du fremdajn lingvojn – anglan kaj esperanton. Kiel rememoro pri la vizito li pentris belan bildon de nia somerdometo en nia "gastlibron". Mi komprenis dum miaj unuaj jaroj, ke ekzistas homoj el diversaj landoj, kiuj parolas diversajn lingvojn. Tio estis bona instruo por la vivo. Multajn jarojn pli poste mia filino diris al mi, kiam ŝi estis samaĝa kiel mi estis en la tempo, pri kiu mi rakontas supre. "Dankon panjo, ke vi montris al mi, ke homoj el diversaj landoj kun diversaj lingvoj estas samvaloraj homoj". Tiu instruo multe helpis al ŝi en ŝia vivo en Usono, kie ŝi loĝas kaj kie loĝas homoj devenintaj el multaj landoj.

Patro provis instrui al mi kaj mia frato esperantan lingvon, sed ni tiam estis malbonaj gelernantoj. Poste ni ambaŭ mem lernis ĝin kaj havis pli malpli longan aktivan vivon en Esperantio. Mi partoprenis la tiatempe faman kurson en Helsingoro. Mi "bonvolis" tion fari, ĉar mi tre ŝatis Danlandon kaj esperis aŭdi danan lingvon. Tie mi renkontis danan knabon, kiu tre energie volis lerni esperanton. Ni korespondis dum kelkaj jaroj kaj tio helpis al la lernado de esperanto.

Dum la venontaj aŭtunaj kaj vintraj monatoj mi laboris en librovendejo en Gotenburgo. Mi loĝis sola en luita ĉambro – sufiĉe enuiga. Mi serĉis esperantoklubon kaj post mallonga tempo mi trovis ankaŭ gejunulojn. Ni aranĝis esperantokurson. Mi instruis – maniero por lerni mem. Ni fondis klubon, kiu i.a. vizitis junularan esperantoklubon en Danlando (Jutlando). Nia klubo aranĝis en Gotenburga arkipelago (Hälsö) la unuan SEJU-renkontiĝon. Kelkaj el ni gejunuloj, kiuj partoprenis la renkontiĝon kreis unuan estraron de SEJU. Dum iom da tempo mi estis sekretariino kaj lernis pli da esperanto kaj iom pri kiel funkcias societo. Entute mi trovis pli da memfido ol mi havis antaŭe. La vivo komencis fariĝi enhavoriĉa. Pluraj el la partoprenintoj de la SEJU-renkontiĝo sur Hälsö restis aktivaj esperantistoj kaj iuj estis dum venontaj jaroj la kerno de la esperanta movado sveda. La gejunula klubo en Gotenburgo ofte dum sabato-vesperoj ekzercadis novajn dancojn. Fariĝis du paroj eble tri –

du, kiuj restis esperantistoj, alia, kiu distanciĝis de esperanto. 20 jaroj pli poste la venonta SEJU-generacio aranĝis jubileon pri la fondiĝo de SEJU sur Hälsö.

Postan someron estis jam tempo partopreni en "monda" junulara kongreso. Ĝi okazis en Avignon en suda Francio. Tie mi renkontis estraranojn de TEJO, junajn homojn, kiuj flue kaj bone parolis esperanton. Mi multege aŭskultis kaj multon lernis. Tiu evento eble estis la vera ŝlosilo al Esperantio. Mi parolis kun italoj, germanoj, francoj kaj alilandanoj. Mi loĝis en ĉambro kune kun germanino, Irmela Giessner, kiu rolis en filmo pri la vojaĝo al UK en Marseille kaj pri tiea kongreso. Tiu filmo troviĝas en la arĥivo de UEA kaj en mia komputilo. Mi memoras kiel ni klopodis prunti gladilon por gladi bluzojn. Ni ne konis la vorton "gladilo".

Mi partoprenis kelkajn UK-ojn kaj ĉiam trovis bonan knabon, kun kiu mi multe parolis kaj plilernis la lingvon. Dum la postaj vintroj ni multe korespondis, io, kio helpis al la lingvolernado. Mi edziniĝis al Åke Rohdin, unu el la grupanoj de la Gotenbarga junulara klubo. Ni translokiĝis al Lund kaj daŭrigis esperantan laboron tie. Ni fondis la tiam modestan revuon "Kvinpinto". Ĝi postvivis dum multaj jaroj, dum kelkaj jaroj sub gvido de mia frato. Mi pensas, ke tiu revuo ankoraŭ spiras aŭ respiras. Ni aranĝis iun novan SEJU-renkontiĝon proksime de Lund.

22-jara mi gvidis vojaĝon de Kopenhago al la TEJO-kongreso en Gdansk. Kia ideo! Oni fariĝas kuraĝa en Esperantio. Oni devis vojaĝi de Kopenhago tra Berlino por atingi Gdansk en tiu tempo, 1959. En la tempo de la fera kurteno ne sufiĉis kun vizo – transirvizo, io, kion mi eltrovis ĉe la vojaĝkompanio, por tranoktado en Berlino, kie ni renkontu esperantistojn. Ni devis havi ankaŭ forir-vizon! Dum la aliaj vizitis la urbon, Orientan Berlinon, mi devis ĝui la tempon ĉe la instancoj por aĉeti forir-vizon. Finfine nia grupo venis al Poznan, kie en la trajno ni renkontis esperantistojn devenantajn el Okcidenteŭropo. La TEJO-kongreso en Gdansk estis por mi pli interesa, ĉar mi konis pli bone la lingvon kaj mi konis pli da personoj. Tie mi lernis, ke esperanto estas same bona, ĉu oni parolas kun homo el tiu aŭ alia lando. Mi parolis kun agrabla knabo longan tempon dum ni laboris en la kuirejo lavante manĝilaron. Fine ni demandis unu la alian el kiu lando ni devenis. Montriĝis, ke ni loĝas 50 kilometrojn de unu la alia en Svedio. Hejmenvenintaj lia urbo kaj mia urbo kunlaboris pri esperanta laboro. Ni aranĝis SEJU-renkontiĝon kaj ankaŭ TEJO-kongreson en Ystad, plej suda urbo de Svedio. Pri la TEJO-kongreso ni kompreneble havis internacian helpon, sed multe de la praktikaj aferoj ni prizorgis.

Post kelkaj jaroj mia edzo kaj mi ricevis filineton. Tio plene okupis nian tempon. Ni ambaŭ havis plentempajn laborojn ekster la hejmo. Tri jarojn poste la filineto ricevis etan fraton. Certe la tempo tiam ne sufiĉis por Esperanto. La infanoj naskiĝis apud Stokholmo, fakte en la sama loko, kie mi nun denove loĝas.

Kiam la filineto estis kvinjara ni translokiĝis al Örebro. Mi tie serĉis la esperantoklubon, ĉar denove tiu temo allogis. La klubo estis malnovspeca esperanto-klubo kun multe da legado de protokoloj kaj similaj aferoj. Post iom da tempo la prezidanto menciis, ke li deziris translokiĝi al alia urbo pro personaj kialoj. Mi estis elektita lian posteulon. La klubo provis havi programojn dum la monataj renkontiĝoj. Mi invitis bonajn esperantistojn el meza Svedio kaj ni havis multajn bonajn programerojn pri diversaj temoj. Mi estis ano de SEF estraro kaj ricevis la taskon inviti prelegantojn el diversaj landoj al Svedio por fari turneojn al diversaj urboj. Plej ofte ili vizitis dekdu diversajn klubojn. La intenco estis, ke la esperanto klubo kunlaboru kun alia "pac-klubo" aŭ lernejoj en sia urbo por tie

prezenti esperantan prelegon interpretitan en la svedan lingvon. Tio okazis bedaŭrinde nur tre malofte. Oni uzis la preleganton nur por fari programon en la esperantoklubo.

Organizi turneojn por eksterlandaj prelegantoj estis tre interesa laboro. Mi ekkonis multajn interesajn homojn kaj denove konstatis kiel internacia estas esperanto. La diversaj kluboj, societoj, lernejoj pagis al la prelegantoj modestan sumon. Mi ofte interpretis, kaj tre ŝatis tion fari. Mi ŝatis aŭskulti per la tuta animo kaj provi redoni la etoson kaj la tekston de la preleganto. Ĉiuj prelegantoj faris tre bonan kaj interesan programon, sed por mencii iujn, kiuj plej influis min estas Zofia Banet-Fornalowa, kiu estis la unua, kiun mi interpretis. Ŝi rapide parolis kaj tio estis por mi vera "bapto de fajro". Ni dum unu semajno faris 16 prelegojn en lernejoj, gimnazioj, seminarioj por infanvartistoj, en edukejoj por flegistinoj, en UN-societo, por personaro de urba biblioteko ktp. En ĉiuj lokoj la temo estis adaptita al la speciala publiko. Plej malfacile estis interpreti en la urba biblioteko kun malfacilaj polaj nomoj de polaj modernaj verkistoj.

Kun ĉiuj prelegantoj mi vizitis gimnaziojn kaj "pac-societojn" kaj vespere ni havis programon en la esperanto-klubo (Örebro). Post ĉiu aranĝo aperis artikolo aŭ intervjuo en la lokaj gazetoj. En la posta loĝloko, Högsby, mi ĉiam vizitis popolaltlernejon. La loka biblioteko ofte havis diversajn programojn sabate. Plurfoje mi aperigis la prelegantojn tie. Iam prezentis koruso kaj dancistoj el Siberio programon kune kun diversaj lokaj enmigrantoj. Ĉiam aperis artikoloj pri la eventoj en lokaj gazetoj. Alia prelegisto, kiu estis granda travivaĵo interpreti, estis Erich Dieter Krause, kiu rakontis pri la liberigo de Orienteŭropo kaj pri la famaj renkontiĝoj en Maria-Kirche (preĝejo) en Leipzig. Li kvazaŭ ludis teatron kaj estis mirakle "akompani" lin kaj provi krei la saman etoson. Prelegisto el Hungario, kiu rakontis pri la historio de sia lando kaj kiu ĉiam estis tre parolema travivis malhelan, vesperan aŭtunan veturadon tra svedaj arbaroj, kie ni meze de la vojo renkontis du grandajn alkojn. Post tiu momento li ne diris vorton ĝis ni estis hejme 1,5 horon pli poste. Kun malpli da bonŝanco neniu en la aŭto plu parolus. Krom la priskribitaj preleĝturneoj mi aranĝis teatrajn turneojn por Jadwiga Gibczynska kaj Jerzy Fornal. Jadwiga Gibczynska havis grandan stokon da memredaktitaj teatraĵoj. Iun fojon ŝi prezentis en lernejo "La lastaj infanoj de Oldrovalo" de germana verkistino Gudrun Pausewang, tradukitan esperanten de Joachim Giessner kaj redaktitan de la aktorino. Ŝi prezentis kaj mi simultane interpretis. Ni miris, sed tio fakte funkciis. Jerzy Fornal prezentis teatraĵojn verkitajn de Harold Brown en lia libro "Eduko Danĝera" dum kelkaj turneoj.

La laboro organizi turneojn kaj interpreti okupis min dum dekdu jaroj. Samtempe mi estis prezidanto de la klubo en Örebro. Kiel reprezentanto de la esperanto-klubo mi estis invitita de la urbo Örebro al ĝemela urbo Dortmund kune kun aliaj societoj. Mia filino kunvojaĝis kiel ano de junulara sekcio, kiu ĵus aranĝis SEJU-renkontiĝon en Örebro. Mi pensas, ke la esperantistoj ĝuis la plej interesan semajnfinojn. Anoj de aliaj kluboj, kiuj fieris, ke ili bone regis la germanan lingvon survoje al Dortmund, survoje hejmen konstatis, ke la germanoj ne kapablis paroli germanan lingvon, ĉar la svedoj ne komprenis. Poste, kiam mi translokiĝis, mi aranĝis klubon en Oskarshamn. Tutan tempon mi gvidis multajn studrondojn en Örebro, iom malpli multaj en la malpli granda urbo Oskarshamn. Kelkfoje la studrondoj estis tre bonaj. Unu fojon (1979) la tuta grupo, kiu ekzameniĝis per "baza sveda ekzameno" vojaĝis al Pollando. Tie ni loĝis en hejmoj de esperantistoj. En nia grupo kunvojaĝis puĉludistino, kiu prezentis teatraĵon, kiun mi tradukis. La puĉludistino, Lisbeth Hamping, prezentis dum SEF-kongreso alian puĉteatraĵon "La Kiso" de Hjalmar Söderberg, kiun mi tradukis por ŝi. Ni havas multajn amuzajn memorojn de tiu vojaĝo. Dum la hejmenvojaĝo la puĉludistino, kiu ne tre bone regis esperanton, rakontis pri sia timo esti "forrabita", kiam ŝia gastiganto veturigis ŝin per aŭto

tra la urbo. Li haltis antaŭ malnova domo, eniris malnovegan lifton, kiu iris supren tra la domo. Ŝia koro preskaŭ haltis pro timo, ĝis ŝi malantaŭ pordo, kiu malfermiĝis, vidis unu el nia grupo. Venontan jaron ni invitis niajn polajn geamikojn festi somermezan feston en Svedio. Tio estas granda somera festo en la verdaj herbejoj kun dancoj, kantoj kaj ludoj. La poloj kompreneble loĝis en la hejmoj de siaj novaj, svedaj geamikoj. Kun kelkaj el la poloj mi retenas vivlongan amikecon. Du el miaj lernantoj vere redonis ion al esperanto. Lars Forsman, kiu dum dekkvin jaroj gvidis internacian esperanto-kurson en la popolaltlernejo de Karlskoga. Li verkis plurajn lernolibrojn kaj libron en la sveda lingvo kiel reklamilo pri sia laboro en Karlskoga, "Esperanto, 50 miljoner träffar". Birgitta Ekvall informas multon pri esperanto kaj instruis en Oskarshamn. Ŝi kaj mi multe kunlaboris, kiam mi loĝis apud Oskarshamn.

En Örebro-klubo mi kun tri aliaj trapasis "superan, svedan ekzamenon". Ebbe Vilborg, lerta esperantisto kaj verkisto de i.a. "Sveda-esperanto vortaro" ekzamenigis nin. Mi tradukis "Fratoj Leonkoro" kaj "Emilo en Smolando" de Astrid Lindgren. Tio donis multajn, bonajn eblecojn al mi. Mi prelegis pri "Astrid Lindgren kaj ŝiaj verkoj" en multaj landoj. Svedio, Danlando, kie Birthe Lapenna estis en la publiko, Finnlando, kie oni aranĝis literaturan renkontiĝon pri Astrid Lindgren, Tove Jansson kaj H.C.Andersen, Pollando kie mi plurfoje prelegis, Estonio, kie mi prelegis en pluraj urboj, Latvio, Litovio, Ĉeĥio en renkontiĝo "Paradiza Ĉeĥio" en Skokovy, en Ukrainio "Aroma Jalta" kaj en pluraj urboj en Japanio. Miaj prelegvojaĝoj donis multe da spertoj kaj interesajn renkontiĝojn. Ni, mia angla amiko Harold Brown kaj mi, vizitis multajn klubojn, vidis multon de Japanio en la bela aprila tempo, kiam floras sakura, la nacia ĉerizofloro. La kluboj invitis nin al "bankedoj" multloke post la prelegoj. Kun niaj japanaj geamikoj ni ĝuis la interesan kaj bongustan japanan manĝon. Ni vizitis templojn, ĝardenojn, tombejojn, montojn, kie situas la bela esperanto-hejmo. Ni partoprenis esperanto renkontiĝon tutlandan, kun multaj partoprenantoj. Unu programero estis interparolo pri kio estas simila kaj kio estas malsimila en niaj landoj. Ni loĝis en pluraj japanaj hejmoj kaj lernis kiel oni bone dormas surplanke sur bonegaj futonoj. La vizito en Japanio estis por ni granda travivaĵo. La lastajn vortojn, kiujn ni aŭdis antaŭ nia foriro estis: "Bone ke ne okazis tertremo dum via restado".

En Högsby kreiĝis Eldonejo Ulekso, kiu eldonis plurajn kajerojn pri esperantovojaĝoj en facila lingvo, kiel lernolibroj dum kursoj. "Eduko Danĝera" de Harold Brown kaj "Fratoj Leonkoro" de Astrid Lindgren Eldonejo Ulekso ankaŭ eldonis. Kelkaj el la libroj estis venditaj dum regionaj renkontiĝoj. Estraranoj de SEF havis taskon zorgi pri diversaj regionoj en la lando. Dufoje jare, dum kelkaj jaroj, mi aranĝis du-tri nivelajn kursojn diversloke en la regiono. Iam Elsbeth Bormann vizitis la kurson kaj gvidis seminarion pri Germanio. Ofte partoprenis 20-30 eĉ 50 kursanoj en la semajnfinaj bonetosaj kaj gajaj kursoj. Ĉiam ni aranĝis niajn kursojn en kursejoj, kie samtempe aliaj kursoj okazis, do ni samtempe "reklamis". En la seminario, kiun gvidis Elsbeth Bormann, partoprenis la fama esperantistino sveda, Anna Alamo-Sandgren. Dum la interparoloj pri diversaj aferoj Anna rakontis ke, ŝi post la milito kun iu kristana organizo vizitis Hamburgon por disdoni manĝaĵon al la infanoj. Elsbeth diris: "Vi donis al mia klaso, kaj ni ĉiuj infanoj ekhavis stomakodoloron pro la salaj haringoj".

En 1980-aj jaroj mi kun mia familio ofte vizitis Francion. Maurice Sujet, kiu dum multaj jaroj estis por mi bona esperanto-instruisto montris dum la vizitoj en Francio sian landon kaj instruis al ni pri malnova franca historio kaj pri la kulturo de sia lando. Dum ĉiuj miaj jaroj en Esperantio, mi havis la bonŝancon renkonti kapablajn esperantistojn, de kiuj mi multon lernis kaj al kiuj mi vere estas dankema.

En Esperantio mi plej kunlaboris kun esperantistoj en Pollando kaj Estonio. Mi vojaĝis kun svedaj dancgrupoj al Folkloro Muzeo en Torun. Festa kaj interesa aranĝo! Ĉiuj dancgrupoj el pluraj landoj iris tra la mezepoka Torun en belaj folkloraj kostumoj al la dancejo, kie ili prezentis siajn programojn. Mi kun "fama", sveda vira koruso el Örebro vizitis Torun kaj Bydgoszcz. En ambaŭ urboj la koruso plurfoje prezentis sian programon. Ili estis ege fieraj kaj sentis sin traktitaj kiel reĝoj. Mi prezentis la programon esperantlingve kaj la pola aranĝanto tradukis polen.

Mi rakontis pri mia lando en la buso de Esperantotur dum kelkaj vojaĝoj en Svedio en Smolando, Kalmar, Öland, Lund/Malmö. Dum du jaroj mi aranĝis programon en Skanio. Ni vizitis la regionon de Höör kaj festis la alvenon de la printempo. Ni vizitis historiajn vidindaĵojn, sed ankaŭ la nov-konstruitan maljunulejon de Höör. Unu jaro estis plene somera vetero kaj la vojaĝantoj tute ĝuis. Posta jaro estis neĝo kaj tute vintra vetero. Iam virino ne retrovis la buson, kiam ni reiru de Malmö al nia tranoktejo. Ni multe serĉis en vendejoj, sur stratoj en pluraj kvartaloj. Mi iris al la polico por informi pri la malaperinta sinjorino. Mi diskutis kun la pola vojaĝ-gvidantino kion fari. Ŝi diris: "La sinjorino ne forkuris por resti en la lando, certe ne, sed ŝi havas malfortan koron kaj eble falis en la kanalon". Divenu, ĉu mi sentis tion kiel bona konsolo? Kia miraklo! Ni trovis ŝin trankvile sidante en seĝo, kiam ni venis hejmen al nia tranoktejo. Kiamaniere ŝi trovis la vojon per trajno kaj taksio? Unu somero buso vizitis Paskallavik en Smolando kaj ni, granda grupo, dormis surplanke kaj rostis kolbasojn ĉe la maro, ludis kaj dancis. Dum ĉiuj tiuj vojaĝoj mi ekkonis Daniela Emler kaj ni fariĝis bonaj amikinoj. Mi partoprenis vojaĝon, kiun ŝi gvidis al Praga UK kaj alian fojon tra tuta Eŭropo de la Baltmara marbordo ĝis La Nigra Maro al Jalta. Mi lernis kiel lerte Daniela kapablis gvidi sian "gregon". Pro la kunlaboro kun Esperantotur mi gajnis premion, vojaĝo al Turkio, kie mi ankaŭ instruis en Kirŝehir dum semajno. Mi havis belan ĉirkaŭvojaĝon en la lando kaj ekkonis la belan kaj interesan urbon Istanbulon kun belaj moskeoj kaj enhavoriĉaj vendoplacoj.

Al UK en Budapeŝto 1983 mi aranĝis busvojaĝon el Svedio. Ni traveturis kvar diversajn ĉefurbojn, renkontis ĉie esperantogrupon, promenis en la urbo kaj tranoktis en ĉiuj ĉefurboj. En Hungario la grupo povis elekti inter tri diversaj antaŭkongresaj aranĝoj antaŭ ol ni kolektiĝis ĉe la kongresejo. Mi rakontis pri la diversaj landoj dumvoje. Eĉ ni havis gimnastikon dumpaŭze en la vojaĝo. Mia filo "gvidis" tion. Ni vidis kaj travivis multon. Kun hungara amiko, kiun mi ekkonis dum tiu vojaĝo, mi ankoraŭ korespondas. De lia amikino mi ricevas belajn bildojn komputile.

Mi translokiĝis de Örebro post divorco de Åke Rohdin. En Oskarshamn/Högsby mi dum 20 jaroj vivis kun mia amiko Harold Brown el Anglio. Ni kune multe laboris pri esperanto. Ni kreis klubon, aranĝis kursojn, vojaĝojn, kreis Eldonejon Ulekson, verkis sonbendon kun 12 svedlingvaj radioprogramoj por informado en "proksimradio". Bedaŭrinde tiu sonbendo perdiĝis dum oni kopiis ĝin por vendi! Ni verkis "Svedio – du flankoj" pri vojaĝo tra Svedio kun japana paro, kiu plurloke prelegis pri Japanio kaj montris la gravan japanan teceremonion. En nia "Flava Domo" ni havis multajn esperanto-gastojn. Harold Brown verkis kaj publikigis "Eduko Danĝera", kiu enhavas dekunu teatraĵojn origine verkitajn en esperanto. Duan eldonon kun eseo pri Harold Brown de Zofia Banet Fornalowa SEF publikigis 2006 omaĝe al centjariĝo de SEF.

Harold kaj mi kune aranĝis vojaĝon por dek personoj al Tomsok en Siberio. Neforgesebla travivaĵo por la partoprenintoj, el kiuj kelkaj laboris kiel oficistoj en la komunuma administracio. Mi ankoraŭ imponiĝas, pri kiel glate ĉio funkciis pensante pri ke en tiu tempo ne troviĝis poŝtelefono, kaj ke apenaŭ drata telefono tiam funkciis al lando malantaŭ la fera kurteno. Eblis kelkfoje sendi

telegramon, al kiu mi eble havis respondon, ĉar oni ne povis fidi la sistemon. Kiam mi volis aĉeti bileton al Tomsk, mi telefonis al Airflot en Stokholmo. Mi petis bileton al Tomsk kaj aŭdis en la parolilo kiel ili laboris komputile por trovi mian bileton. "Bedaŭrinde ili diris. Tiu urbo ne ekzistas." Mi pensis, ke estis iu lernanto, kiu ne konis pri la urboj en Rusio. Mi provis ankoraŭ unu fojon, duan fojon, trian, kvaran. Mi devis sendi telegramon al mia kontaktulo en Tomsk, ke lia urbo ne ekzistas. Iun nokton je la tria-kvara horo sonoris la telefono. La amiko el Tomsk. Mi devis tuj ĉion kompreni, memori kion mi volis demandi kaj, kaj, kaj. La rezulto estis, ke mi aĉetu bileton al Moskvo kaj ili renkontos nin tie. Tio bone funkciis, sed ni devis vojaĝi al la enlanda flughaveno, en Moskvo, sufiĉe longa vojo. Ni svedoj, kiuj ne estis same rapidaj kiel niaj rusaj amikoj malhelpis nian rapidan iradon al la buso. Ni devis preni alian aŭtobuson kaj per magiaĵo de niaj amikoj ni finfine atingis la aviadilon por plurhora flugado al Tomsk. Estas vero, ke en Siberio estas malvarme. Baldaŭ ni estis en esperantejo, kie oni bonvenigis nin per pano kaj salo, malnova tradicio bonvenigi karajn gastojn. Tio estis la komenco de tre enhavoriĉa semajno kun niaj rusaj gastigantoj. Nia grupo estis la unua "turisma" grupo en Tomsk. Kaj ni povis loĝi en hejmoj de niaj gastigantoj. Mirakla vojaĝo! Grandegan dankon al niaj amikoj en Tomsk, kiuj kapablis tiel bone ĉion aranĝi. La vojaĝo donis al ni neforgeseblajn memorojn kaj geamikojn. La adiaŭan vesperon mi ricevis telegramon, ke mi fariĝis avino! Ĉiuj gratulis kaj tostis kun mi. Postan jaron ni invitis dekpersonan grupon el Tomsk kaj aranĝis programon por ili. Ni vojaĝis al diversaj lokoj ĉirkaŭ Högsby, vizitis gimnazion en Kalmar, faris programon en popolaltlernejoj en Öland kaj en Oskarshamn, havis grandan feston kaj programon kune kun enmigrintoj en Högsby. En la rusa grupo kunestis paro, kiu gajnis tutsovetan danckonkurson. "Io por eta Högsby"! Alia festa semajno! En la ĉirkaŭaĵo de "La Flava Domo" kaj en Oskarshamn homoj sciis, kio estas esperanto. La gazetoj skribis!

En malnova vitrofarejo Björkshult, kie nun estas hoteleto mi aranĝis seminarion pri vivo de virinoj en kelkaj landoj. Okazis en kadro de UEA "Virina agado" kun Elsbeth Bormann. Politikistinoj el ĉiuj svedaj partioj partoprenis. Sveda studorganizo kunaranĝis. Okazis prelegoj pri situacio de virinoj el kvin landoj. Mi interpretis ĉiujn prelegojn, ĉar la svedaj politikistinoj ne komprenis esperanton. Ni okazigis esperanto-kurson, kiun Audrey Childs-Mee gvidis (preskaŭ la lasta kiun ŝi faris). Jadwiga Gibszynska prezentis teatraĵon pri la vivo de virino. Partoprenanto, profesia muzikistino, el Svisio donis orgenkoncerton en la loka preĝejo. Ni sidis vespere sur herbejo apud rivero diskutante pri diversaj temoj. Vetero, kursoj kaj prelegoj, manĝaĵo, etoso, ĉio estis bonega! Mi ŝatus, ke tia aranĝo povus okazi plurfoje, sed pro diversaj malhelpoj ne eblis.

Pola buso kun infanoj el suda Pollando vizitis Svedion 1986. En mia urbeto, Högsby, ili tranoktis kelkajn noktojn ĉe lernejoj. Tiu klaso estis invitita viziti la polajn infanojn en Tatra, sed la svedaj instruistoj ne volis preni al si la laboron. Bedaŭrinda afero, ĉar estus neforgesebla memoro por 12-jaruloj! La pola infangrupo prezentis sian folkloran dancprogramon en pluraj lokoj en Svedio. Ili faris tre bonan kaj artan programon en lernejoj, diversaj grupoj, hospitaloj. Kiam ili revenis Pollanden la buso estis plena de vestaĵoj donacitaj al ili, ĉar estis ankoraŭ tiu tempo, kiam Pollando havis problemojn.

Dum la 1990-aj jaroj mi vizitis Estonion. Ahto Kaljusaar kaj mi ekis kunlaboron inter niaj landoj. Mi invitis geestonajn prelegojn – turneojn – kanti en Svedio. Ahto Kaljusaar, kiu estas ĵurnalisto prelegis pri la kantanta revolucio, preskaŭ antaŭ ol la svedaj gazetoj skribis pri tio. Samtempe mi komencis viziti Estonion kun dekpersonaj grupoj miksitaj inter esperantoparolantoj kaj ne esperantoparolantoj. Ni loĝis en hejmoj de estonaj esperantistoj. Unu el la gastoj parolis esperanton, la alia ne konis la

lingvon. Kvinfoje mi aranĝis tiajn vojaĝojn. Kompreneble ni pagis al la gastigantoj. La valutakurzoj tiam estis aliaj ol nun (2012). Por ĉiu certe la renkontiĝo inter la homoj estis la plej grava. Multaj el la svedoj diris, ke estis ilia plej interesa vojaĝo!

Ni invitis dekpersonan grupon de geestonoj al la SEF-kongreso en Oskarshamn 1992. La esperantoklubo tiea volis lanĉi la kongreson kiel "Kultura kongreso internacia". Ni havis artekspozicion kun tri pentristoj, unu el Estonio, kiu venis kun la estonoj, Sergej Bondin el Krasnojarsk, kiun ni renkontis dum nia vojaĝo al Tomsk kaj Harold Brown el Anglio/Svedio. Post la kongreso ni montris la bildojn en kelkaj bibliotekoj kune kun informiloj pri esperanto kaj pri la bildoj. Jerzy Fornal prezentis teatraĵon de Harold Brown: "Vagabondo". Harold Brown prelegis pri arto kaj verkado. Jerzy Fornal vizitis urban infanvartejon kaj montris mimarton al la infanoj. Tio estas ankaŭ lia fako. Multaj informoj pri la kongreso en lokaj radio kaj gazetoj. Multaj eksterlandaj gastoj inter la 125 kongrespartoprenantoj. La eksterlandanoj estis intervjuitaj antaŭ la kongresa publiko, kvazaŭ "interkona vespero". La ideon ni prenis de vesperaj televidaj programoj. Post la kongreso ni turismis kun la estonaj gastoj dum kelkaj tagoj – vizitis la urbon de Astrid Lindgren kaj la mondheredaĵon Öland kaj aliaj lokoj. Ankaŭ en Estonio mi ankoraŭ havas daŭrajn amikinojn. Bedaŭrinde kelkaj ne plu surtere. Dum tiu kongreso mi ekŝiĝis de la estraro de SEF.

Poste mi pli dediĉis min al privataj vojaĝoj kaj renkontiĝoj per esperanto, krom ke mi iom helpis al Katalin Kováts pri materialo, kiam ŝi skribis sian libron pri Tiberiu Morariu: "Stelsemantoj el la nordo".

Nun mi tenas kontakton kun malnovaj geamikoj, trovas iujn novajn, io, kio ankaŭ estas grava, skribas etajn tekstojn, kiujn mi uzas kiel leteroj al la geamikoj. Kelkfoje mi repensas pri malnovaj tempoj. Sed ankaŭ ĝojas pri la nuna tempo!

Dum mia vivo en Esperantio mi interesiĝis pri kursoj – multaj gelernantoj sidis antaŭ mi ekde la gejunuloj en Gotenburgo ĝis la klubanoj en Oskarshamn. Plej multaj estis ili en Örebro.

Mi interesiĝis pri kulturo – prelegantoj pri diversaj temoj – kelkfoje mem prelegis diverslande – vojaĝi kaj renkonti malnovajn kaj novajn geamikojn – homoj estas la plej gravaj.

Dum miaj lastaj jaroj mi informis pri esperanto, aranĝis programojn kaj interpretis en "Senior-centro" apud Stokholmo.

Informi – tio estas ankaŭ paroli kun homoj. Eĉ se multaj semoj falas sur la rokojn, tamen kelkaj semoj eble fariĝas novaj plantoj.

Plej grava estas lerni, ke homoj el diversaj landoj povas interkompreniĝi kaj esti geamikoj.

La vivo en Esperantio aliĝis mian vivon, pliriĉigis mian vivon, instruis al mi multon.

Dankon d-ro Zamenhof!

Dankon d-ro Esperanto!

Dankon al ĉiuj geamikoj vivantaj kaj al tiuj ankoraŭ ne plu vivantaj!

Kerstin Rohdin

2015